



TEA-BULTENO

4^a JARO

APRILIO 2001

NUMERO 4



AGENDO



70^a Itala Kongreso de Esperanto

Trieste 28 julio - 1 aŭgusto 2001

Eŭropo 2001: Kulturoj - Lingvoj - Esperanto
Estas tiu ĉi la jaro, kiun Eŭropa Unio kaj Eŭropa Konsilio dediĉis al lingvoj, al ilia instruado kaj al ilia disvastigo. Per tiu ĉi agado oni intencas atentigi eŭropajn civitanojn pri la fakto, ke kultura kaj lingva diverseco estas promociacia faktoro kaj neniam baro al paca kunvivado.

Estas tiu ĉi la jaro, kiun esperantistoj dediĉis al kultura plureco, al lingva diverseco kaj al la tiurilataj problemoj, konstante aperintaj, precipe en la internaciaj rilatoj, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

Tiu ĉi 21^a jarcento ŝajnas esti la tutmondiĝa jarcento: ĉiutage ni vidas ĝiajn spurojn - ekonomio kaj komerco ne plu havas limojn, sed nur merkatojn kaj laboristojn. Kaj la laboristoj hodiaŭ aktivas en Italio, Germanio, Rusio, morgaŭ en Usono, postmorgaŭ eble en Ĉinio aŭ Sud-Ameriko.

La lingva diverseco en Eŭropo, en la mondo, povas ŝajni malbeno al tiuj kiuj partoprenas seminariojn kun la angla kiel laborlingvo kaj bedaŭras ne esti denaske angla-parolantoj. Ĉu ne estus bele, kaj eĉ profite, se ĉiuj parolus saman lingvon?

La lingvoj de Eŭropo, de la mondo, estas grandioza riĉaĵo. En ili dormetas kulturo kaj historio de la homaro kaj ĉiuj kune konsistigas heredaĵon kies gardado devas havi prioritaton. Sed la homaro...

... kiamaniere frontas tiujn ĉi problemojn ligitajn al lingva plureco kaj al la oportuneco havi komunan lingvon por internaciaj rilatoj?

Kiuj kostoj kaŝiĝas en plurlingveco?

Kiel gardi la diversajn etnajn identecojn, la ecojn de la popoloj? Kiel konservi la kutimojn kaj tradiciojn proprajn de ni ĉiuj?

Ankaŭ pri ĉio ĉi ni diskutos kaj interŝanĝos opiniojn dum la kongresaj laboroj. Aktualega temo, ĉu ne? Nu, ankaŭ VI estas invitata alporti vian kontribuon.

Programon, aliĝilon, hotelmendilon kaj aliajn informojn oni povas trovi en nia paĝaro ĉe:

<http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html>

Grava informo por Esperanto-filatelistoj

En la inaŭgura tago, dimanĉon la 29^{an} de julio, funkcios de la 10^a ĝis la 18^a h. poŝtoŝtampa ĝiĉeto en la kongresejo. Tiam oni ricevos specialan stampon sur bildkartoj kun la simbolo de la kongreso.

Vere "speciala" stampo, ĉar, unuafoje en Italio, la teksto estos ankaŭ en Esperanto.

1 D

2 L

3 M Ordigo de TEA-arkivo

4 M

5 Ĵ

6 V Prikongresaj laboroj

7 S

8 D

9 L

10 M Ordigo de TEA-arkivo

11 M

12 Ĵ

13 V Prikongresaj laboroj

14 S

15 D **Bonan askon!**

16 L

17 M Ordigo de TEA-arkivo

18 M

19 Ĵ

20 V Pri kongresaj laboroj

21 S Malferma Tago ĉe UEA

22 D

23 L

24 M Ordigo de TEA-arkivo

25 M

26 Ĵ

27 V Kartludado: Rumio

28 S

29 D

30 L



Ne eraras nur kiu nenion faras!

Malferma Tago ĉe UEA

La **CENTRA OFICEJO** de UEA en Roterdamo invitas al sia 14^a Malferma Tago sabaton, la 21^{ma} de aprilo. Ankaŭ ĉi-foje la vizitantoj povos aŭskulti kaj diskuti kun eminenta movadano, d-ro **Werner Bormann**, prezidinto de la Akademio de Esperanto kaj longtempa UEA-estrarano. El inter multaj kampoj, pri kiuj li jam longe okupiĝas, d-ro Bormann elektis kiel temon de sia kontribuo en la Malferma Tago la evoluon kaj defiojn de la faka lingvo de Esperanto.

Aparte grava ĉi tiu tago por unu el la oficistoj de la CO, Rob Moerbeek: fakte ĝi estos la lasta Malferma Tago antaŭ lia emeritiĝo. Tial li havos propran programon por rememori sian 32-jaran servadon en la sidejo de la Asocio.

Kiel kutime, krom specialaj ofertoj, la libroservo rabatos la prezojn de ĉiuj siaj varoj je 10%. Funkcios bazaro de esperantaĵoj kaj la tutan tagon oni povos spekti Esperanto-filmojn. Ĉiu vizitanto povos partopreni en senpaga loterio kaj babili kun aliaj ĉe la senpagaj kafo kaj teo. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

Eldono 2001 de PASPORTA SERVO

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de **TEJO, PASPORTA SERVO**, nombras 1161 gastigantojn en 80 landoj. En la du lastaj jaroj la reto kreskis preskaŭ je unu kvarono. Francio okupas la unuan lokon kun 103 gastigantoj kaj Germanio la duan kun 94. Sekvas Rusio kun 87. Aliaj landoj kun multaj adresoj por vojaĝantaj esperantistoj estas Pollando (63), Britio (52), Usono (49), Ukrainio (48), Brazilo (46), Japanio (41), Nederlando (36), Hungario (35), kaj Bulgario kaj Irano (po 34).

En la bele presita 198-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj, tiel ke eblas facile plani la vojaĝon. Enestas reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo kaj aliaj utilaj adresoj.

Esperantistoj, kiuj membras en la **PASPORTA SERVO**, rajtas senpage tranokti ĉe la gastigantoj. Membro de **PASPORTA SERVO** estas ĉiu kiu posedas la adresaron. Gastigantoj ricevas la libron senpage, la aliaj povas ĝin aĉeti.

La ideon pri **PASPORTA SERVO**, tiam sub la nomo *Programo Pasporto*, prezentis argentinano Ruben Feldman Gonzalez en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Caș el Francio. Ambaŭ pioniroj troviĝas inter la gastigantoj ankaŭ en la plej nova eldono. La nuna administranto de la servo estas Derk Ederveen el Nederlando.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 10,80 eŭroj plus afranko (plus imposto de 6% en €). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

esp@ranto

Antaŭ nelonge la nordbohemia urbo Most (Ĉeĥio) havas siajn oficialajn paĝojn

<<http://www.mumost.cz>> ankaŭ en Esperanto danke al esperantistoj el loka klubo Jiri Rada kaj František Bina. Se vi vizitos la paĝon, ĝi aperas unue ĉeflingve, sed en la dekstra supra angulo estas angla kaj germana flagetoj kaj simbolo de Esperanto, tra kiuj vi povas iri al angla, germana kaj esperanta versioj de la paĝoj. Ankoraŭ ne

estas tradukitaj ĉiuj paĝoj, sed ambaŭ samideanoj diligente daŭrigas la laborojn. Most estas la unua ĉeĥa urbo, kies oficialaj TTT-paĝoj havas ankaŭ Esperantan version. La aŭtorino de la paĝoj, Jana Zambová, kiu ne estas esperantistino, estis surprizita, ke al ŝia adreso (zampova@mumost.cz) venis pluraj gratuloj.

El Ret-Info: *Informis Miroslav Malovec starto@clavis.cz*



Iu kuracisto renkontis survoje iun sian pacieron kaj diris al li: "Mi ne vidas vin jam de jardekoj. Kial vi ne venas ĉe mi por kontroli vian sanon?"

"Ĉar mi ne bezonas vin: mi manĝas, dormas, laboras ktp. Mallonge, mi sentas min sana".

"Ĉu vere?" respondis la kuracisto. "Atendu momenton". Kaj tiel dirinte, per sia polekso li malsupren tiris la suban palpebron de la dekstra okulo. "Haj, haj, jen... vi suferas je hepato..."

"Ĉu? Mi neniam rimarkis tion" respondis la paciento.

"...kaj ankaŭ via intesto ne bone funkcias..." daŭrigis la kuracisto.

"Ĉu?" hezitis la paciento.

"...kaj ankaŭ via lieno estas analizenda..." insistis la kuracisto.

"Ĉu vere? Ĉu vere ĉion ĉi vi vidas en la okulo?"

"Memkompreneble" verdiktis la kuracisto.

"Ĉi-kaze, bonvolu rigardi en la maldekstran okulon, ĉar la dekstra estas el vitro!" respondis la paciento.

KUMEŬAŬA NUN ANKAŬ HISPANLINGVE

Originale verkita en la Internacia Lingvo kaj ĝis nun tradukita al 21 naciaj lingvoj, tiu ĉi mondfama romano de la eminenta esperantisto, esploristo kaj etnologo, Tibor Sekelj, finfine aperas ankaŭ en la hispana. Zorgis ties tradukon la venezuela esperantisto, verkisto, adv. d-ro Alfredo Guillermo Cook.

Tiu bele prezentita libro, kun originalaj ilustraĵoj de Adriana Contreras, sendube havas grandan edukan valoron. La detalema kaj zorgema priskribo de la kutimoj, la lertecoj kaj kapablecoj adaptitaj al la ekologiaj cirkumstancoj de la indianoj troviĝantaj en la brazila Amazonio enhavas gravan etikan kaj moralan mesaĝon. Tutcerte pro tiuj ecoj la japanaj edukaj instancoj decidis, ke KUMEŬAŬA iĝu deviga legaĵo por 10-13-jaraj lernejoj.

KUMEŬAŬA, LA FILO DE LA ĜANGALO estas la unua libro el la abunda kaj vastiĝanta Esperanto-literaturo, tradukita kaj publikigita hispanlingve en Venezuelo. Ĝis nun, la VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO aperigis du gravajn verkojn de la venezuela literaturo, ambaŭ tradukitajn al Esperanto de Fernando De Diego, nome DOÑA BARBARA de Romulo Gallegos kaj KANTO AL LA AGRIKULTURO DE LA TROPIKA ZONO de Andrés Bello.

KUMEWAWA, EL HIJO DE LA SELVA estas havebla ĉe Venezuelo Esperanto-Asocio, Apartado 47675, Caracas 1041A. Pliaj informoj ĉe ven-esperanto@yupimail.com

El Ret-Info: *informis J.E. Baĉriĉ*

BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

Tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349